

Movada historio:

Skandaleca historio de la Esperanto-movado en GDR science reanalizita

Antaŭ nelonge (en junio 2023) aperis la 2a korektita kaj kompletigita eldono de la germanlingva libro *“Esperanto in der DDR. Zwischen Verbot und Duldung“ de Hartwig Wischendorf. 2. korrigierte und ergänzte Aufl. Books on Demand 2023.*

Enhave nenio fundamente ŝanĝiĝis en la dua eldono.¹ Estis korektitaj kelkaj tajperaroj kaj precipe kompletigitaj la ĉapitroj pri la “eksterpolitika” flanko de la agado de CLE/GDREA, kiuj traktas antaŭ ĉio la malfacilaĵojn de Detlev Blanke kun la poloj, sed ankaŭ kun la sovetiaj kolegoj, kiuj ne pretis aŭtomate aliĝi al la ideoj kaj efektiviĝi la projektojn de la “Centra Laborrondo en la Kulturligo de GDR” (CLE), la oficiala Esperanto-organizo en GDR, kiujn Blanke proponis al la sovetiaj e-istoj en Moskvo. Por ĉi tiu 2a eldono estis ekspluatitaj pluraj interesaj dokumentoj de la Ministerio por Ŝtata Sekureco de GDR (Stasio) el diversaj jaroj, kiuj ne povis esti konsideritaj en la 1a eldono.

Kronologie temas pri la ĉi-sekvaj epizodoj:

1966 – kiel CLE maltrafis sian aliĝon al UEA

En **ampleksa raporto de la 13a de aprilo 1966** la Stasio okupiĝis kvazaŭ bilance kaj konklude pri la agado kaj taskoj de CLE unu jaron post la oficiala permeso de la Esperanto-movado en GDR. Post sia fondo CLE strebis fariĝi membro (landa asocio) de Universala Esperanto-Asocio (UEA) por penetri en la internaciajn strukturojn de la Esperanto-movado, kaj planis peti kaj atingi la aliĝon dum la 51a Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝto, Hungario, en 1966. Prenante UEA-n sub la lupeon, la Stasio kredis esti konstatinta „certan dekstran orientiĝon“ en tiu organizaĵo. Kiel konfirmon por tiu politike motivita aserto oni menciis incidenton okazintan dum la 50a UK en Tokio, Japanio, kie „la UEA-estraro konfiskis kolektitajn subskribojn kontraŭ la malpura milito de la usonanoj en Vjetnamio kaj malpermesis plian kolektadon de subskriboj“. Ĉi tiu kolektado estis efektivigita de Esperanto-Mondpaca Movado (MEM), fifama neneŭtrala Eo-fakorganizaĵo, „en kiu superregas reprezentantoj de la socialismaj landoj“. Krom tio la Stasio konstatis evidente kun certa konsterno, ke „en la estraro de UEA, kiu ampleksas 9 personojn, ekzistas nur unu reprezentanto el socialisma lando (Pola Popola Respubliko)“ kaj „en la Komitato (egalas al parlamento) de 72 membroj estas nur 18 el socialismaj landoj“. Do tiun ĝenan malekvilibron oni volis ŝanĝi. Fakte por SED, la reganta komunisma ŝtatpartio de la GDR-diktaturo, gravis, ke CLE agadu en la „senco de la politiko de la partio kaj registaro“ de GDR, kiel oni notis en la raporto, ĉar io alia ne estis imagebla. Pro tio oni konsideris necese aligi CLE-on al UEA por povi ludi en tiu monda asocio pli influan rolon kiel socialisma lando.

En tiu klopodo oni devis rilati kun prof. Ivo Lapenna, kiu estis prezidanto de UEA, kaj, kiel konate, forta kritikanto de la sovetia bloko. Pro tio en Moskvo UEA estis eĉ suspektata kiel kontraŭ-komunisma organizaĵo. Lapenna respondis al CLE, ke aliĝo en principo eblas, sed la GDR-anoj devis pruvi, ke CLE estas politike neŭtrala kaj havas superpartian karakteron.

¹ Detala prezento de la 1a eldono de lia libro estas trovebla sub https://www.planlingvoj.ch/Wischendorf_Esperanto_DDR_Rezension_Eo.pdf.

Kompreneble CLE tion ne povis pruvi, ne posedante la petitajn dokumentojn, kaj finfine rezignis pri aliĝpeto.

Nur en decembro 1967 la demando pri aliĝo de CLE al UEA reaktualiĝis. Por tiu celo la Ministerio por Eksteraj Aferoj de GDR postulis de CLE ellabori koncepton por aliĝo. Sed ankaŭ ĉifoje la afero ne evoluis laŭ la imagoj de SED kaj ree ekstagnis.

La raporto konfirmis, ke por "sekurigi" la laboron de CLE „en la gvidorganon estis nomitaj nur politike fidindaj e-istoj kaj aliflanke engaĝitaj neoficialaj kunlaborantoj [de la Stasio]“. Estis ankaŭ notite, ke inter e-istoj okazas „negativaj diskutoj“ pri kamarado Menger, precipe pro tio, ke li mem ne estas e-isto. En la unua estraro de CLE, kiu estis prezidata de Rudi Graetz, lia anstataŭanto Eugen Menger ricevis la oficon de la sekretario kaj rolis kiel kontrolisto flanke de la Kulturligo, kies dungita li estis.² Kadre de la „operaca laboro“ de CLE la planoj kaj intencoj de GEA, la okcidentgermana Eo-asocio, por „influi la Esperanto-movadon en GDR“, devis esti observataj kaj kontraŭstarataj. Ĉiuj tiuj indikoj klarigas, ke la ĉefa tasko de CLE (kaj poste GDREA) estis, kiel komisiito de la Kulturligo kaj finfine de SED kaj Stasio, kontroli la Esperanto-movadon de komunisma la GDR-diktaturo kun la celo eviti "malamikajn" influojn de ekstere.

En la sama raporto de aprilo 1966, kiu estas grava por kompreni la (negativan) sintenon de la SED-reĝimo rilate al la Eo-movado – en kiu cetere ne ekzistis principa diferenco inter la tempo de Ulbricht kaj Honecker –, la Stasio okupiĝis ankaŭ pri laŭdiraj „kalumnioj de kelkaj e-istoj kontraŭ aliaj membroj de CLE“, pri „intrigoj“ kaj „reakciaj tendencoj“ en la Esperanto-movado. Estis avertite, ke „malgranda parto de la malnovaj aktivaj e-istoj provis antaŭenpuŝi tiel nomatan senpolitikan agadon kaj asociumadon³ en la malnova burĝa senco en kelkaj Esperanto-cirkloj.“ La raporto nomis kelkajn GDR-ajn e-istojn, kiuj per sia politika malkonformeco estis suspektataj de la Stasio kiel „negativaj e-istoj de GDR“: Unuavice temis pri konataj aktivuloj kiel Ludwig Schödl (Neuruppin), Curt Kessler (Dresden), Franz Tischer (Magdeburg), Hieronymus Stroinski (Zweufurth/Leipzig), Karl Maier (Berlin), Walter Ranft (Radebeul), kies problemoj kaj spertoj kun la GDR-reĝimo estis pli detale analizitaj en la unua eldono de la libro de Wischendorf. Tiuj homoj restis kvazaŭ dumvive stigmatizitaj de SED kiel elementoj malamikaj al la socialismo – al tiu stigmatizo Blanke esence kontribuis per konstanta denuncado de tiuj honorindaj Eo-aktivuloj ĉe partiaj organoj kaj instancoj, kvankam iuj el ili kiel Schödl suferis akran politikan persekutadon jam dum la nazia tempo kaj poste kiel socialistoj aŭ komunistoj en la GDR-diktaturo mem. Ideologie kaj politike tiel forte agordita dum la malsankta SED-periodo pri ŝtataj malamikoj, Blanke, kiu asertis, ke li estas socialdemokrato, malfavore parolis pri tiuj homoj, kiujn li konsideris „Eo-stranguloj, fanatikuloj kaj sektuloj“, eĉ ankoraŭ en reunuigita Germanio, kiam ili jam longe estis mortaj. Ŝajnas, ke Blanke konsiderinde troigis, kiam li klopodis protekti sian organizaĵon de „fanatiko, sektemo kaj kontraŭpartia agado“ en la kredo fari ion utilan por savi la Eo-movadon en GDR. Tiu principa sinteno ne ŝanĝiĝis, kiam poste li gvidis la Societon por Interlingvistiko (GIL). Sed fana-tika konduto kaj sektema sinteno estas vere nenio fremda al la Eo-movado. Sed kial Blanke neniam kritikis la sektemon de la gvidaj SED-pintuloj aŭ la fanatikon „lia“ Stasi-estro Erich Mielke?

Pri Ulrich Lins, iama vicprezidanto de (Okcident-)Germana Esperanto-Asocio (GEA), estis notite, ke li vizitis la Printempan Foiron en Lepsiko, kie li faris iun deklaron pri la sinteno de GEA al CLE, kiu evidente estis raportita al la Stasio kaj registrita de ĝi. Al GEA, „kiu negative elpaŝas internacie“, la Stasio riproĉis, ke „dum mondkongresoj, en kiuj ĝi partoprenas, ĝi

² La trajtoj kaj rolo de la Kulturligo de GDR kaj ĝia ligiteco al SED kaj Stasio estis traktitaj jam en la recenzo pri la 1a eldono kaj aliloke.

³ Germanlingve Vereinsmeierei, kiu havas negativa sencon.

konstante provas disvastigi agitmaterialon de la Ministerio por Tutgermanaj Demandoj en Esperanto“.⁴

Dorno en la okuloj de la Stasi-anoj estis la kontaktoj de simplaj GDR-aj e-istoj, kiuj vojaĝis inter Okcidento kaj Oriento. La Stasio plendis, ke CLE ne kapablas plene kontroli la ligojn de siaj membroj kun Okcidenta Germanio kaj Okcidenta Berlino. Ĉefe temis pri privataj vojaĝoj de GDR-pensuloj al Okcidenta Germanio, kiuj estis utiligitaj por viziti Eo-kongresojn kaj starigi diversajn pli profundajn rilatojn kun homoj de aliaj landoj. Alia problemo estis ‘sovaĝaj’, t.e. ne aŭtorizitaj vojaĝoj de GDR-civitanoj al socialismaj landoj. Ankoraŭ alia zorgiga temo rilatis al la ‘kontraŭleĝa’ ricevado de Eo-literaturo el kapitalismaj landoj tra la kanalo de socialismaj landoj por eviti konfiskon, pri kio estis detale raportite en la 1a eldono de la libro de Wischendorf. Kuriozaĵo en tio estis, ke la komunisma GDR-diktaturo klopodis eviti, ke la revuo *El Popola Ĉinio* el Pekino atingis la landon de komunismaj laboristoj kaj kamparanoj. Ĉi tiu altgrade mensoga kaj trompa propaganda publikaĵo ĝenerale raportis pri la ‘paradiza’ kaj feliĉa vivo en maoisma Ĉinio, sed por e-istoj ĝi estis alloga gazeto, ĉar presita sur altkva-lita papero kaj kun amaso da koloraj bildoj. La vorto cenzuro estis evitata. Alia akra dorno en la okuloj de la Stasi-anoj estis „strebadoj formi Eo-grupojn en altlernejoj kaj universitatoj“ en kelkaj urboj de GDR, kiel la Stasio observis. Sed CLE (kiu reagis aparte alergie al ĉiusecaj sendependaj junularaj kaj studentaj agadoj, kiujn ĝi rigore sufokis) sukcesis maleb-

⁴ La “historiisto” Ulrich Lins, aŭtoro de la fama libro *La danĝera lingvo*, aperinta unue parte kiel artikolaro en la 1960aj jaroj en *Germana Esperantisto* kaj en 1988 kiel aparta libro, estis kvazaŭ la okcidentgermana Eo-ĝemelo de Detlev Blanke, kun kiu li intime kunlaboris en reunuigita Germanio en komunaj projektoj, ekzemple en festlibro por Humphrey Tonkin, longjara prezidanto de UEA dum la komunisma erao. Same kiel ĉiuj aliaj germanaj Eo-aŭtoroj, kiuj eventuale havis ĉi-rilatan scion, ankaŭ Lins obstine prisilentadis en siaj historiografiaj kaj biografiaj verkaĵoj la Stasian kunlaboron de tiu ŝajne netuŝebla orientgermana Eo-korifeo. Blanke notis ankaŭ lian nomon en siaj denuncraportoj, kiujn li verkis por la Stasio, pro kio Lins estis probable bone konata al ĝi. Ne estas konate, ĉu Lins mem konsultis la Stasiajn aktojn pri Blanke, sed tio estas tute imagebla. Cetere la nomita verko de Lins, kiu estiĝis sub la impreso de la okcident-germana kontraŭ-sovetia propagando de la tempo de la Malvarma Milito, mirinde milde traktis la politikan rolon de la oficiala Eo-asocio de GDR, kiu estis ĉefgvidata kaj rigore kontrolata de la Stasi-agento Detlev Blanke, kiu ege alergiis al kritiko el Okcidento. En sia postparolo al la 2a, sovetia, t.e. en Sovetunio represita eldono de *La danĝera lingvo* (Progreso, Moskvo 1990), Blanke draŝe kritikis kelkajn partojn de la libro, kiujn li trovis „ne tute kontentigaj“, imputante al ĝia aŭtoro, ke li „misinterpretis“ kaj „misprezentis“ diversajn temojn, precipe tiujn pri la postmilita situacio en la Eo-organizaĵoj de la socialismaj landoj, aparte GDR. Laŭ Blanke, homoj, kiuj ne loĝis en socialisma lando kaj ne estis marksistoj-komunistoj, ne povis kompreni kio tie okazas/is. Blanke rekomendis en „iam prilaborota nova eldono“ „forigi kelkajn mankojn“ „por prezenti tion, kio vere okazis, kaj por preventi misprezentadojn“. Al Lins mem li konsilis, ke preferu li „konsultu kompetentulojn de la landaj asocioj [de la socialismaj landoj] por iom pli objekte kaj zorgeme priskribi kaj interpreti.“ Krome Blanke malŝatis, ke Lins tute ne menciis la unuan prezidanton de CLE, Rudi Graetz, kiu „tre impete kaj saĝe agis por la rekonstruado de la Eo-movado en GDR“ (cetere ankaŭ Graetz estis Stasi-agento), kaj ke li trovis kritikinde, laŭ kutima opinio de e-istoj, ke sekretario Eugen Menger „eĉ tute ne sciis la lingvon“. Blanke skribis, ke la fakto, ke „sociaj organizaĵoj aŭ ŝtataj organoj partoprenas en la reorganizado de la esperantista movado en la socialismaj landoj“, ŝajne „ĝenerale estas supektinda por la aŭtoro“. Blanke opiniis, ke „la aŭtoro tre strange argumentas pri la ŝtata subteno [de Esperanto]“, se li skribis sur p. 493: „Ili (la reĝimoj de la socialismaj landoj – D.B.) tion apenaŭ faris pro tio, ke ili malkovris la utilon de la lingvo por propagandi eksterlande siajn socialismajn atingadojn (kvankam tia uzo ja okazas), sed ĉar ili komprenis, ke permesi kaj legalizi la Esperanto-movadon estas pli prudente, ol subpremi ĝin kaj per tio nutri potencialon de malkontento.“ Oni povas imagi, ke Blanke estis ŝokita kaj ĉagrenita, kiam li legis tiun frazon, kiun li devis percepti kiel cinikan rimarkigon, kvankam ĝi iel trafis la esencon, sed esprimis nur parton de la vero. Fakte ambaŭ aŭtoroj parolis ĉirkaŭ la varma kaĉo, dum neniu el ili pretis konfesi la veron pri la intencoj de la ŝtata „subteno“, kiu konsistis krom en la propagando de la socialismo, kiu inkluzivis unuflankecan, malhonestan kaj falsan prezentadon de la historio, ĉefe en la financado de la rigida (socia kaj politika) kontrolado de la oficiala, centre organizita Eo-movado en GDR fare aŭ pere de SED kaj Stasio. Ĉi tiu baza kaj centra fakto de la tuta historio de GDREA same kiel la Stasi-agenteco de Blanke mem estis prisilentitaj ankaŭ en la prilaborita 2a eldono de *La danĝera lingvo* de 2006, en kiu Blanke estis tuŝita nur dufoje en aliaj kuntekstoj. (AK)

ligi tiajn aktivecojn, estis laŭde notite. Ankaŭ provoj enkonduki Esperanton kiel instrufakon en lernejojn aŭ elsendojn en la radion aŭ la produktado de Eo-insignoj, kiuj ne estis oficiale permesitaj de CLE, devis esti evititaj.

La aliĝo de CLE al UEA finfine efektiviĝis en 1976. En 1981 la nomo de CLE estis ŝanĝita al "Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR", kiu internacie diskoniĝis kiel GDREA. (ĉap. Aussenpolit. Schwerpunkte)

1979 – la problemkatalogo de Blanke

En 1979 Detlev Blanke, kiu intertempe avancis kiel potenca sekretario de CLE, kunmetis ***„Problemkatalogon pri demandoj de la mult- kaj duflanka kunlaboro de la Esperanto-asocioj de la socialismaj landoj“***. Laŭ tio CLE kunlaboris unuavice kun la Eo-asocioj de Bulgario, Ĉeĥio, Slovakio, Pollando, Hungario, Vjetnamio kaj Sovetunio (USSR). En tiu raporto Blanke prilamentis precipe la malfacilan kunlaboron kun la pola Eo-movado, ĉar li ne povis vidi ĝian pretecon konsideri „internaciismajn vidpunktojn“ kaj respekti la „neceson de internacia interkonsento por komuna agado de la internacia Esperanto-movado“. Nu tiaj kodaj vortoj kaj frazoj signifis nenion alian ol kanti koruse aŭ ĥore kaj danci laŭ la fajfilo de la oficiala politiko de la Moskvo-obeemaj komunismaj partioj aŭ eventuale eĉ pli preferinde laŭ la rekomendoj de kamarado Blanke en orienta Berlino mem, kiu ne hezitis persone komenti, laŭdi aŭ mallaŭdi la agadon de iuj Eo-asocioj de aliaj socialismaj landoj, kio estis konsiderata de ili kiel nedezirata enmiksiĝo. Fakte precipe ĉe la aŭtonomemaj, kritikemaj kaj malfacile kontroleblaj polaj e-istoj jam frue aperis alergia kontraŭ la trudiĝemaj ambicioj, postuloj kaj atendoj de Blanke, kiun oni malŝatis kiel pedantan, fanatikan kaj diktatorecan partian funkciulon, kiun oni primokis kiel specon de grandinkvizitoro aŭ Gvidanto, ekzemple en Bulgario, laŭ la memoro de la recenzanto.

La polan movadon Blanke kritikis, ke ĝi estas gvidata de malkompetenta personaro, kio rilatis precipe al ĝia politika – fakte „kontraŭkomunisma“ – sinteno. Fakte la politikaj ambicioj de la poloj estis limigitaj, same malpopulara estis la deziro kunlabori kun CLE, kiun oni preferis eviti. GDR kaj Pollando konsideris unu la alian kvazaŭ kiel malamikon, kvankam ili devis esti socialismaj fratoj. Blanke plendis, ke la pola asocio „ne estas interesata pri ekzakta politika kunlaboro, sed nur pri turisma interŝanĝo. Multflankaj interkonsentoj ne estas respektitaj. La internacia reputacio de la asocio estas penseble malbona“. Nu tio estis la persona, subjektiva kaj pure politike motivita opinio de Blanke, ĉar la pola Eo-movado estis internacie alte respektata kaj admirata pro ties amasa karaktero kaj populareco en Pollando mem. Kun sia glora historio Esperanto ĝuis vastajn kaj sincerajn aprobon kaj agnoskon ankaŭ flanke de la ŝtataj instancoj, kvankam la stilo de la publikaj propagando kaj informado kaj la kvalito de la Eo-presorganoj estis eble eĉ pli mizeraj ol en GDR. Due, la pola Eo-movado funkciis laŭ propraj logiko, linio aŭ kurso kaj metodoj kaj tute ne estis tiel rigore kaj krude traktata de la politika reĝimo kiel en la komunisma GDR-diktaturo, kvankam ankaŭ en Pollando ekzistis similaj ĝenaj politikaj kaj ekonomiaj limigoj kaj obstakloj, kiuj turmentis ĉiujn enloĝantojn de komunismaj landoj. Ekzemple li asertis, ke en Pollando „ne ekzistas ligo al la partio“. Nu ankaŭ tio ne estis vera. Certe ankaŭ en Pollando la Eo-movado estis kontrolata de la komunisma partio kaj observata de la enlanda sekureca servo, kaj ankaŭ la polaj e-istoj tute ne ĉiam povis fari kaj diri kion ili volis, ekzemple publike kritiki la komunisman partion, la socialisman sistemon aŭ Sovetunion mem ktp. Blanke, kiu lernis lerte intrigi kaj denunci en GDR, aludis la publikajn disputojn kaj malkonkordon inter la pola Landa Asocio PEA kaj la Eo-Komitato de la Pola Socialisma Junulara Asocio kaj evidente konkludis, ke la pola komunisma partio havas neniun influon al la Eo-movado de tiu lando, kio por li estis komplete neeltenebla afero. Sekve la pola movado estis konsiderata (de Blanke kaj liaj CLE-anoj) kiel politike „malfidinda“, dum la bulgara kaj ĉeĥoslovaka movadoj trovis la pritakson kiel „bonvolaj, sed malbone

preparataj“. Malgraŭ tiuj mankoj Blanke tamen konstatis, ke almenaŭ „la influo de la socialismaj landoj konsiderinde kreskis lastatempe en UEA“.

Fakte ankaŭ la sovetia Eo-asocio (ASE), fondita en 1979, ne estis protektita de la ĉion atinganta kaj tuŝanta kritiko de Blanke, kiu estis ege malpacienca kaj prema persono, kiu postulis ankaŭ de la sovetiaj samideanoj (ĉefe viroj), ke ili ludu pli aktivan rolon, ĉar la atendoj, kiujn oni (en orienta Berlino) havis de ili, ĝis nun ne estis plenumitaj. Sed eble li ankaŭ ne tute komprenis aŭ ne volis kompreni la problemojn, kiujn tiuj kompatindaj sovetiaj kolegoj havis kun la praktika vivo en sia hermetike fermita lando. Inter alie li skribis: „... Estas ege malfacile inviti sovetiajn reprezentantojn al GDR-aranĝoj. La stato de la kunlaboro ne konformas al la politikaj celoj, deziroj kaj realaj eblecoj, kiel ili estas vidataj flanke de CLE.“ Nu en tiu tempo Sovetunio pro diversaj kialoj malvolonte sendis proprajn civitanojn al eksterlando, inkluzive la orientan blokon. Sed ŝajnas, ke la situacio tamen iom post iom pliboniĝis kaj en 1987 oni jam povis emfazi la bonajn rilatojn kun la sovetiaj amikoj. Moskvo sendis ekzemple reprezentantojn al la (fifamaj) “Konsultiĝoj de la Eo-Asocioj de la socialismaj landoj“, kiuj en certaj rondoj de movadaj aktivuloj estis priridetitaj kiel sekretaj (kaj eĉ konspiraj) kunvenoj de la ĉefaj Eo-asocioj de komunismaj landoj, ĉar protokolo ne estis publikigita kaj “klas-malamikoj“ el Okcidento ne estis invititaj kaj ne rajtis partopreni.

Samtempe li esprimis la deziron, ke ankaŭ Ĉinio povus pli forte engaĝiĝi en la internacia Eo-movado, kio estis preskaŭ iom hereza vidpunkto, se oni konsideras la negativan rilaton, kiun SED havis al KPC. (ĉap. Weitere aussenpolitische Aspekte)

1981/83 – la “kazo Amri Wandel“

Kiel aliloke priskribite, la politikaj-diplomatiaj rilatoj inter la komunisma orienta bloko, do ankaŭ GDR, kaj Israelo estis malfacilaj, komplikaj kaj perturbitaj. Ankaŭ en la kazo de la Eo-movado ne ekzistis escepto. En Moskvo UEA estis eĉ suspektata kiel cionisma organizaĵo. Kiam do en **1981 israelano estis elektita kiel prezidento de TEJO** (Tutmonda Esperantista Junulara Asocio), la junulara sekcio de UEA, en la orienta bloko eksonoris alarmo kaj ĉe Blanke kaj kompanio eksplodis granda nervozeco. Ĉe la kontestata israelano temis pri la internacie konata TEJO-aktivulo Amri Wandel, kies nomo eĉ ne aperis en la Stasi-aktoj kaj protokoloj de Blanke, kiuj estas konservataj kaj konataj. Ŝajnas, ke en SED oni timis, ke tiu elekto povus havi negativajn sekvojn kaj ke la socialisma tendaro povus perdi sian influon. Ĉi tiu okazaĵo estis kialo por Blanke pridiskuti la malfavoran aferon kun iu kamarado de la Mini-sterio por Eksteraj Aferoj de GDR en marto 1982. En la protokolo de la interparolo kun la ministeria kamarado Blanke notis, ke estas „necese, ke la socialismaj landoj interkonsentu tiel, ke la israelano estu kiel eble malelektita dum la TEJO-kongreso okazonta en 1983 en Hungario“. Tio havis la odoron de komploto. La nova situacio devis esti diskutita ankaŭ dum la 15a Konsultiĝo de la Eo-asocioj de la socialismaj landoj en Jerevano, Armena SSR. Fine la problemo solviĝis kaj elvapiĝis de si mem dum la menciita TEJO-kongreso en komunisma Hungario en 1983, kiam Wandel ne rekandidatiĝis, ĉar li jam atingis la aĝan limdaton por tia kandidatiĝo. Tion li klarigis, kiam oni demandis lin en februaro 2023 pri tiu ĉi epizodo. En sia respondo li ankaŭ asertis, ke li sciis nenion pri la intrigoj, kiuj okazis malantaŭ lia dorso (kion oni povas kredi aŭ ne). Eble necesus konsulti aliajn atestantojn de tiu tempo, ĉu ili povus raporti pli pri ĉi tiu temo.⁵ (ĉap. Mitarbeit in internationalen Gremien)

⁵ Cetere en la raporteto pri la jerevana konferenco, kiu aperis en *der esperantist* (oficiala organo de GDREA), oni (kompreneble) skribis nenion pri ĉi tiu temo, same kiel mankis ajna mencio eĉ nur alude pri la komunisma "puĉo" kontraŭ Amri Wandel en la informbulteno *TEJO tutmonde!* de la jaro 1983.

Sinteno kaj rolo de Germana Esperanto-Asocio (GEA) kaj la vero pri la GDRa movado

Kio koncernas la sintenon de GEA en la GDR-fina fazo, ĝiaj gvidantoj evidente celis ekskludi la demandon de la politikaj proksimeco kaj komploteco de la GDREA-strukturo al la reganta komunisma SED-reĝimo, kaj eviti la diskutojn pri ĝi, ĉar oni timis, laŭ supozo de Wischendorf, ke tio povus ĝeni kaj perturbi la sukcesan procezon de la interproksimiĝo de ambaŭ germanaj Eo-asocioj en la periodo de la reunuiĝo de Germanio.⁶ Krom tio la nimbo de la senmakuleco de la Eo-movado devis esti konservata, kiel la libroaŭtoro trafe skribis, kiu bone ekkomprenis la celojn, intencojn kaj naturon de la Eo-movado. Sed la Eo-movado estis ĉio alia ol sankta afero, almenaŭ en GDR. La tabuado kaj prisilentado de la rolo kaj karaktero de la SED-proksima Eo-organizo estas praktikata ĝis hodiaŭ, pro kio kritika traktado de la aferoj estas praktike malhelpata. Ankaŭ la "kazo Amri Wandel", aktive stirita de Blanke malantaŭ la kulisoj, restis forgesita, kvankam pri ĉi tiu klare antisemitisma (aŭ almenaŭ antisionisma) epizodo, kiu estis protektita de la orienta bloko, necesus reokupiĝi por ekscii pli kaj kompreni kio tiam vere okazis.

Resume oni venas al la klara konkludo kaj konstato, ke la SED-reĝimo krude enmiksiĝis en la aferojn de la Eo-movado en GDR, ke CLE/GDREA estis nenio alia ol mizera dependa lakeo-vasalo en la servo de la SED-reĝimo kaj kontrolata de la respondecaj ministerioj kaj precipe de la Stasio, kies lojala komplico Detlev Blanke estis. Ĉiuj agadoj kaj tendencoj de e-istoj, kiuj estis interpretitaj de la SED-reĝimo kiel kontraŭpartiaj kaj kontraŭ-socialismaj, estis senkompatate subpremataj kaj persekutataj. La elspezoj, kiujn SED "investis" por Esperanto, estis utiligitaj por funkciigi la aparaton por kontroli la Eo-movadon en la komunisma GDR-diktaturo kaj por financi la ŝtatan propagandon en Eo. Blanke kaj aliaj (false, erare) interpretis tiun financadon kiel ŝtatan subtenon favore al la Esperanto-movado. Eble ili simple mensogis laŭ kutimo de reprezentantoj de tiu politika sistemo. Kompreneble Detlev Blanke neniam estus konfesinta tiun fakton laŭ tiu ĉi versio. Male li perfekte sukcesis flegi kaj vendi la legendon de la „ŝtata subteno“ de la oficiala Eo-movado en GDR, kiun li laŭdegis kiel eksterordinaran, elstaran kaj esceptan kontribuon flanke de iu ŝtato kaj raran okazon por apogi kaj progresigi Esperanton. Pri la okcidentaj Eo-organizoj li kutimis diri, ke ili povas nur „revi“ pri tia ŝtata subteno, kiun la e-istoj „ĝuas“ en GDR. Ĉu Blanke kaj aliaj konsciis pri la alta politika prezo, kiu estis pagenda por tiu subteno? Fakte temis pri giganta miskompreno: **Ne Esperanto mem estis subtenita** de ŝtata mono, sed, kiel dirite – necesas plurfoje ripeti ĝin, por ke la e-istoj ĝin fine komprenu –, la **politika kontrolado de la Eo-movado de GDR kaj la ŝtata politika propagando en Eo**. La historia tragedio konsistas en tio, ke la internacie Eo-movado volonte kredis tiun legendon, kiu konserviĝis kiel mito fakte ĝis nun en la menso de la e-istoj. Kaj UEA, kies landa asocio CLE/GDREA estis, ne kritikis, sed toleris tiun situacion, sekvante la fabelojn de Blanke, kiu estas konsiderata kiel grava korifeo kaj movada kvazaŭsanktulo ĝis nun. Fakte ĝis hodiaŭ estas uzataj verkoj de Detlev Blanke (1941-2016) kiel baza fakliteraturo de la interlingvistiko kaj esperantologio, sur kiu esploristoj, sciencistoj, studentoj kaj eĉ universitataj profesoroj baziĝas, kredante kaj transprenante la mitojn kaj legendojn, kiuj estis disvastigitaj de Blanke, kiu mem zorgis, ke la historiografio estu skribita kaj prezentita en „ĝustaj“ lumo, senco kaj spirito. La samtempoj volonte kredis tiujn fabelojn kaj mensogojn, ĉar mankis propraj scioj, konoj kaj spertoj, esploroj kaj alternativaj prezentaĵoj pri la Eo-movado (ne nur de GDR), pri kiu ajnaj kritikaj kaj objektivaj traktaĵoj estas tiel maloftaj kaj raraj. Ĉar la menciitaj mitoj kaj legendoj perfekte taŭgas kaj bone servas al la Eo-propagando, neniuj reprezentanto de la "oficiala" Eo-movado estas interesata okupiĝi pri ĉi tiu temo kaj preta korekti la ekzistantajn tradiciajn bildojn kaj imagojn. Ĉu Blanke, kiu tamen estis sufiĉe inteligenta kaj klera homo, mem kredis kion li asertis kaj rakontis, estas malfacile diri, ĉar mankas enketoj

⁶ En 1989-94 prezidanto de GEA estis Wolfgang Schwanzer, kiu prizorgas la libroservon de GEA (https://eo.wikipedia.org/wiki/Wolfgang_Schwanzner). Laŭ scio de la recenzanto li rifuzas vendi la libron de Wischendorf.

kaj atestoj. Sed pro sia politika programado sur la „alia flanko“ estas verŝajne, ke li estis konvinkita pri la propraj asertoj kaj teorioj kaj pri iliaj ĝusteco kaj praveco, same kiel praktike ĉiuj „ĝisostaj“ e-istoj, kiuj kredas, kion ili lernis kaj eksciis pri Esperanto. (komp. ĉap. Resümee)

Grava laboro, utila studo kaj necesa verko

La libro de Hartwig Wischendorf, kiu permesas rigardi malantaŭ la fasadon de la oficiale rakontitaj legendoj kaj mitoj pri la Eo-movado en GDR, grave kontribuas al la sentabuigo de la ĝis nun praktikataj sekretoj, prisilentoj kaj falsprezentoj pri la GDRa Eo-movado kaj reobektivigas la torditan historiografion. La verko definitive korektas la ĝisnunan rozkoloran bildon pri la Eo-movado en komunisma orienta Germanio, kiu estis pentrita de Detlev Blanke kaj aliaj “historiistoj” kaj kredata de granda parto de la cetera Esperanto-movado, kiu siatempe tondre aplaudis la „sukcesojn“, „progresojn“ kaj „rekordojn“ de la Eo-movado en la socialismaj landoj, kvankam temis pri iluzioj kaj vezikoj, kiuj poste krevis.

Hartwig Wischendorf estas surpriza kaj mirinda fenomeno: Li ne estas esperantisto, sed aperis neatendite kiel brilanta stelo de la ĉielo kun grava laboro (aŭ misio), nome kun la celo klarigi la veron pri la Eo-movado de GDR. Lia leginda, gratulinda kaj dankinda libro, kiun tiu verama, absolute kompetenta kaj fidinda aŭtoro el Ŝverino verkis en sia alta vivaĝo, estas deviga modelo por esplorantoj kaj verkantoj kiel tia temo devus esti traktita, kiel tia studo devus esti farita kaj kiel tia libro devus esti verkita. Estontaj esplorantoj de la historio de la Eo-movado en GDR (kaj aliaj socialismaj landoj) do ne plu povos okupiĝi pri tiu historio sen konsulti kaj utiligi lian libron, kvankam ĝi estis krude ignorata de la Eo-movado ĝis nun. Estas karakterize por la stilo, praktiko kaj intencoj de la Eo-movado, ke lia libro estis nek konsiderita en interlingvistikaj kaj esperantologiaj bibliografioj nek recenzita de e-istoj mem nek menciita en vikipediaj kaj aliaj artikoloj pri Blanke kaj la GDRa Eo-movado, kaj nek estas revendata de Eo-libroservoj. Post kiam la idiotoj, kiuj redaktas la Eo-Vikipedion, longe ignoris la laboron de Hartwig Wischendorf, en julio 2023 ili finfine transprenis iun ŝanĝproponon de li sur la koncerna paĝo (kiu estas evidene sur strikta kontrolo) por korekti iun eraron, sed lasis lian libron daŭre nemenciita en la literaturlisto de la koncerna paĝo, kie estas indikita plej diversa fatraso kaj komplete mankas indikoj pri la Stasi-aktiveco de Blanke aŭ la rolo de la Stasio kaj SED en GDREA.⁷ Ĉu ĝi estas tiel embarasa temo, kiu detruus la ĝisnunajn bildon kaj imagon pri la Eo-movado en la komunisma GDR-diktaturo, ke oni prefere evitu ĝin kiel la diablo evitas la benitan akvon? Estus do tre utile, se tiu libro, kiu ŝajnas esti senerara, ekzistus ankaŭ en plena Esperanto-traduko, por ke ankaŭ negermanlingvaj e-istoj povus konatiĝi kun la traktitaj temoj kaj nove publikigitaj konoj kaj informoj.

Hodiaŭ ne plu ekzistas multaj esperantistoj en orienta Germanio. Post la pereco de GDR ili grandparte malaperis, multaj forpasis.

La libro *Esperanto in der DDR. Zwischen Verbot und Duldung de Hartwig Wischendorf. 2a korektita kaj kompletigita eld. Books on Demand (bod.de, bod.ch) 2023* estas mendebla kaj havebla ĉe ĉiuj pli grandaj naciaj kaj internaciaj retlibrobutikoj, ekzemple Buecher.de, Amazon.de, Thalia.de, Tolino.de, Ebook.de, Hugendubel.de, Osiander.de, Rupprecht.de, Geniallokal.de, bod.de (en Germanio), sed ankaŭ ĉe orellfuessli.ch, exlibris.ch kaj bod.ch (en Svislando) en printita kaj elektronika eldonoj.

© www.planlingvoj.ch, julio 2023 (AK)

⁷ https://de.wikipedia.org/wiki/Esperanto-Verband_im_Kulturbund_der_DDR.